

La Espero

SVENSKA ESPERANTOTIDNINGEN

Nro 1/1987 ★ Kr 8,50

Esperanto 100 jaroj



La unua lernolibro de esperanto kiu estis eldonita 1887 en Pollando en la rusa, pola, germana kaj franca lingvoj. Sur la bildo vi povas vidi la unuan svedan lernolibron, eldonitan 1889.

Esperantoförbundet

Adress: EsperantoCentro,
Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm,
Telefon: 08-11 74 34.

EsperantoCentro är öppet
måndag-torsdag kl. 17-19.
Postgiro: 20 12-3, Esperanto-
förbundet.

Medlemsavgift:
Direktansluten medlem 75 kr
ungdomsmedlem t.o.m. 20 år 35 kr,
familjemedlem (utan tidning) 25 kr.
Prenumerationsavgift för *La Espero*
ingår i medlemsavgiften.

Medlemmar under 30 år är samtidigt
medlemmar i Sveriges Esperantisters
Ungdomsförbund och får dess tidning
Kvinpinto. Om du inte får den, med-
dela födelseår till Esperanto Centro.

Esperantoförlaget

Postadress:
Box 7502, 200 42 Malmö.

Besöksadress:
Möllevångsgatan 20 B.

Öppettider: 1 sept.-15 maj:
onsdagar 10-11, torsdagar 17-18.
Skriftliga beställningar expedieras
hela året, även under sommarén.

Telefon: 040-12 20 29.

Postgiro: 578-5.

Expedition: Wivi Nilsson.

Styrelsens ordförande:
Anita Lindblom.

La Espero

Organ för Svenska Esperantoför-
bundet

Adress: EsperantoCentro
Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm tel
08-11 74 34

Ansvarig utgivare: Bertil Åkerberg

Redaktör: Karin Lindquist
Västermov. 19, 732 00 Arboga
tel 0589-155 31

Utformning: Bertil Danielsson,
Prästgårdsv 8, 672 00 Årjäng
tel 0573-105 69

Fotosats och tryck:
EsperantoCentro, Stockholm 1986



SEF:s styrelse

Ordförande: Karin Lindquist (La Es-
pero massmedia)
Västermov. 19, 732 00 Arboga,
tel 0589-155 31.

Sekreterare: Anita Lindblom
(kansliet, medlemsfrågor)
Mariehamngatan 18
163 27 Spånga
Tel 08-751 73 79

Kassör: Börje Andersson (massmedia)
Ingeg. 4 A, 541 50 Skövde
tel 0500-122 05

Vice ordförande: Märtha
Andréasson, (SEF-årskongresser)
PI 2265, 425 00 Hisings Kärra
tel 031-57 11 33

Styrelseledamot: Kerstin Rohdin
(turnéer, bibliotek)
Ringv. 11 B, 579 00 Högsby
tel 0491-204 61

Styrelseledamot: Åke Rohdin (utred-
ningar)
Engelbrektsg. 25 A, 702 13 Örebro,
tel 019-18 53 60

Styrelseledamot: Haldo Vedin (utveck-
ling)
Jordbrogatan 57
603 64 Norrköping
tel 011-16 26 87

Suppleant: Ingemar Nordin (kans-
liet).
Mosebacke torg 8, 116 46 Stockholm,
tel 08-41 46 37

Suppleant: Bertil Andreasson
(utbildning, nordiskt samarbete)
Södra Rörum, 242 00 Hörby
tel 0415-501 52

Informationskommittén: Bernt
Lindquist
Västermov. 19, 732 00 Arboga tel
0589-155 31

La Espero

Utgivningsplan för 1987

Nr 1 10 febr (man.stopp 10 jan)

Nr 2 31 mars (manusstopp 15
febr)

Nr 3-4 31 maj (manusstopp 15
april)

Nr 5 31 juli (manusstopp 15 juni)

Nr 6-7 30 sept (manusstopp 15
aug)

Nr 8 30 nov (manusstopp 15 okt)

Manuskripten skall sändas till
redaktören, Västermovägen 19,
732 00 Arboga. Dessa skall vara
maskinskrivna med dubbelt rad-
avstånd, inga förkortningar och
bokstäverna skall vara rätt över-
tecknade. Manuskripten skall va-
ra av en sådan kvalitet att en icke-
esperantist direkt skall kunna sät-
ta dem.

Annonspriser i La Espero

1/1-sida	kronor 1.200
1/2-sida	kronor 725
1/4 sida	kronor 425
2 spalter x 6 cm	kronor 250

Prenumera- tionspriser m m

FOKUSO pris 60 kr
en ny tidskrift som skall innehålla
ett avsnitt - Internacia Kom-
putado. Den sänds under 1987 till
IK:s prenumeranter 1986, vilka
inte fått någon tidning.

LITERATURA FOIRO nytt pris:
145 kr. Planvingvistiko uppgår
från 1987 i Literatura Foiro.

**NORVEGA
ESPERANTISTO 60 kr.**

Kallelse

Esperanto-Förlagets årsmöte äger
rum den 12 april kl 10.00 i Riks-
dagshuset, Stockholm.

Medlems- avgifter

Klubbanslutna medlemmar betalar till klubbkassören den avgift som beslutats på klubbens årsmöte.

Direktanslutna medlemmar betalar sin medlemsavgift till SEF:s postgiro 20 12-3.

Avgiften är kr 100:– för huvudmedlem och kr 50:– för familjemedlem (utan tidning) och kr 50:– för direktanslutnen ungdomsmedlem.

Esperantofrämjandet

Avgiften är kr 20:– Denna avgift gäller naturligtvis inte för klubb- eller direktanslutna medlemmar, utan det är dessa medlemmar, som skall försöka värva esperantofrämjare bland sina arbetskamrater, vänner, släktingar... Just nu har vi cirka 150 esperantofrämjare. Om varje medlem värvar 1 (en) esperantofrämjare har vi cirka 1.500... Nog kan vi klara av det, eller hur?

Avgiften sändes till SEF:s postgiro 2012-3. Särskild värningsblankett finns på Esperanto Centro.

Vi uppmanar alla kategorier av medlemmar att snarast betala in sina medlemsavgifter. Det underlättar mycket för både klubbkassörer och SEF:s kassör. Nu under jubileumsåret har vi alla händerna fulla av andra uppgifter...

Medlemsavgifter till UEA finner du i nr 8 av La Espero. Likaså kongressavgifterna till SEF-kongressen i Stockholm och UEA-kongressen i Warszawa. Har du ännu inte prenumererat på esperantotidningar finns uppgift om dessa i nr 7.

Prezidanto:

Se ni rigardas malantaŭen kaj sumigas kion ni atingis dum la 100 esperantaj jaroj, kion oni do povas konstati? Ĉu ni estu kontentaj? Kompreneble ne. Ni ankoraŭ ne estas ĉe nia celo – ke ĉiuj homoj povas paroli esperanton krom sia nacia lingvo. Sed se oni pensas pri la fakto ke 1887 nur unu homo parolis esperanton kaj hodiaŭ eble 10 milionoj tamen estas progreso!

Por doni dimension al tiu rezulto mi volas citi Ingemund Bengtsson: "Al tiuj, kiuj diras ke esperanto nur estas 100-jara revo, mi diras ke la revo pri paco estas 1000-jara sed ni neniam forlasas tiun revon". Sed malgraŭ tiuj iom konsolaj vortoj, ni komencas esti iom malpaciencaj. Ni volus ke homoj estu tiel saĝaj ke ili elektu esperanton kiel sian duan lingvon.

Sed ni bone scias ke tio ne okazos per si mem. Nur nia streĉa kaj konstanta laboro, kio ĉefe estas informi pri esperanto kaj instrui ĝin, donos rezulton. Nia revo estas ricevi tiom da mono ke ni povus dungi unu aŭ kelkajn spertajn kaj kapablajn personojn por labori plentempe por esperanto. Bedaŭrinde La Edukada Departemento neis nian peton pri salajra subvencio por unu persono. Sed ni daŭrigas serĉi monon diversloke.

Kiujn realigeblajn viziojn ni povas havi por la estonteco – diru 10 jaroj antaŭen?

- La ekonomia situacio de UN estas tia ke ili devas baldaŭ pripensi ŝparplanon kaj kio estas la plej efika ol enkonduki esperanton anstataŭ la multaj laborlingvoj?



- La Edukradio havas kursojn en multaj lingvoj, kial ne elsendi kurson en esperanto?

- Jam nun estas eble elekti esperanton kiel aldonan lingvon, kaj la paŝo elekti esperanton kiel B- kaj C-lingvojn, mi esperas estus eble en ne tro malproksima estonteco, dank'al niaj parlamentanoj, kiuj proponos pri esperanto en la lernejo!

- Nia materialo pri esperanto kiel rimedo por paco kaj internaciismo nun baldaŭ estos distribuata al la lernejoj, kaj mi esperas ke ni ĉe la lernantoj plialtigos la konsciencon pri esperanto kiel helpilo al internacia komuneco.

- La internaciaj organizoj komprenos ke esperanto estas la solvo de iliaj lingvaj problemoj trans la limojn!

Mi kredas ke tiuj estas realigeblaj vizioj, sed realigeblaj nur se ni ĉiuj kunlaboras.

Proverbo diras ke neniam flugas rostitaj paseroj en niajn buŝojn. Ni bone scias tion. Pro tio ni nur devas kalkuli je nia propra forto.

Ĉion bonan por nia jubilea esperanta jaro!

Karin Lindquist

Humphrey Tonkin, prezidanto UEA

Esperanto en la dua jarcento

Tamen ĝi moviĝas... Tamen, cent jarojn post sia fondiĝo, Esperanto vivas kaj kreskas kaj gajnas adeptojn. La cinikuloj diris, kaj ankoraŭ diras, ke lingvo kreita de unusola homo ne povas esti vivipova. Tiuj skeptikuloj ne komprenas, ke la lingvo de Zamenhof tre baldaŭ fariĝis la posedajo de tiuj, kiuj parolis ĝin, kaj ke tiuj personoj larĝigis, akriĝis kaj precizigis tiun lingvon por pretigi ĝin por la estonteco. La lingvo Esperanto ekzistas en nia mondo kiel defio al tiuj, kiuj tro malvaste surpaperigas la leĝojn de la lingvistiko, kaj tiuj kiuj dubas pri la valoro kaj la ebleco de efektiva internacia komunikado en spirito de egaleco.

Unu jarcenton post la kreiĝo de Esperanto, ni parolantoj kaj uzantoj de la Internacia Lingvo rajtas fieri pri la atingoj de nia lingvo – pri la grandaj disvastigantoj de tiu lingvo, homoj kiel Cseh, Butler, Haudebine, Friis; pri la grandaj organizantoj, kiel Hodler, Bastien, Lapenna, Mijake, Hujucz; pri la grandaj ideologoj, kiuj trovis en Esperanto ilon kaj realiĝon de siaj ideoj, kiel Lanti kaj Privat; pri la poetoj kaj verkistoj, kiuj de Grabowski ĝis Auld kaj pluen vivigis kaj animis nian lingvon; pri tiuj, kiuj studis la lingvon kaj ĝian kulturon, kiel Waringhien, Wüster, Wells. Precipe, ni rajtas fieri pri la centmiloj, eĉ milionoj, da homoj, kiuj uzis kaj uzadas nian lingvon por ĉiuj

celoj, kaj tenas ĝin aktuala kaj preta je ĉiu uzo.

Same ni rajtas fieri pri la institucioj, kiujn kreis kaj subtenas niaj kolegoj – la eldonejoj, la asocioj, la institucioj, la bibliotekoj, la gazetoj, la radiostacioj, la libroservoj, la kongresoj, la kursejoj.

Ni rajtas fieri, ke nia lingvo mem fariĝis institucio, kaj ke scio de tiu lingvo nun etendiĝas, pli aŭ malpli profunde, tra la tuta mondo. La esperantista spirito, reprezentita en la spirito kaj la animoj de homoj en plej disaj partoj de la terglobo, ne estas elradikigebla plu: ĝi estas konstanta elemento en la monda intelekta pejzaĝo.

Sed tio ne igu nin malatentaj. Ni devas daŭre nutri kaj plifortigi nian movadon, ĉar ni havas respondecon daŭrigi la vojon al la ĝeneraligo de Esperanto kiel internacia komunikilo.

Movado, kiu ne reproduktas sin mem, mortas. Nia unua devo kiel parolantoj kaj uzantoj de Esperanto estas instrui la lingvon al aliaj. Entuziasmaj pri tiu aŭ alia sukceso en oficialaj medioj aŭ tiu aŭ alia Esperanto-kongreso, ni organizantoj de la Esperanto-movado tro facile forgesas tiun simplan fakton. Por efike instrui la lingvon ni bezonas bonajn kaj modernajn lernolibrojn, ni bezonas bonajn sonbendojn, ni bezonas komputilajn kursojn. La venontaj kelkaj jaroj devas esti jaroj de la instruado de Esperanto, kaj ni devas kune labori por produkti la bezonatajn ilojn.

Movado, kiu ne disanoncas sian ekziston, perdas sian kontakton kun la ekstera mondo. Tro multaj



esperantistoj ĝuas sian Esperanton kaj sen granda entuziasmo alrigardas epokon kiam Esperanto estos ĝenerale uzata kaj ilia sekreta lingvo ne plu sekretos. Ni devas malfermi nian movadon al la ekstera mondo, pli ofte informi la publikon pri nia ekzisto, kaj pli emfaze montri la atingojn de Esperanto kaj ĝia movado.

Movado, kiu ne priatentas la fluon de la ekstera mondo, fariĝas nekapabla ekspansii. Ni devas zorge studi la fluon de la internacia komunikado, la evoluon de internaciaj organizaĵoj, la internacian politikon, la internacian komercon, por scii kiel direkti niajn argumentojn, kiel saĝe prezenti nian lingvon, kiel montri, ke ĝi efektive utilas.

Sume, necesas instrui la lingvon, informi pri la lingvo, lerni pri la teritorio, kiun ni volas konkuri por nia lingvo. Jen la taskoj en la komenco de la dua jarcento de la Internacia Lingvo.

★
ESPERANTO
100 JAROJ



Sveda Jarkongreso
10-13 aprilo 1987
STOCKHOLM

Esperanto en Svedio

Elektita, eta rapidkolekto

La Unua Libro. Kiam la Unua Libro de Esperanto aperis en 1887 en Polujo, ĝin sekvis en kelkaj jaroj aliaj diverslingvaj eldonoj. D-ro Zamenhof mem kolektis plurajn diversnaciajn adresojn. Inter tiuj evidente troviĝis ankaŭ kelkaj svedoj.

La unua sveda. En 1889 juna studento el Ystad G Henriclundqvist uzis la unuan libron de Zamenhof por krei la Unuan Libron de Esperanto por svedoj. Jam en 1890 alia svedo, iu studento A.F. Runstedt, Uppsala, verkis novan lernolibron por svedoj en formo de flugfolio. Rezulto estis en 1891 la Esperanto-Klubo en Uppsala, la dua en la mondo. Eĉ tria libro aperis en 1892. Verkis G.H. Backman, Helsingborg, laŭ la germana eldono.

La Himno. La svedo Claes Adelsköld komponis en 1890 la unuan melodion de la "Himno de Esperanto", kaj Svedujo tiamaniere estis konata en la internacia movado. (La melodion poste sekvis alia, kiun ni nun uzas).

La Uppsala — periodo. Nova studento — Paul Nylén — aĉetis lernolibron en 1892 kaj poste fariĝis membro de la klubo en Uppsala. Pro diversaj kaŭzoj la gazeto "La Esperantisto" ne plu povis aperi, sed la klubo en Uppsala tuj deklaris sin preta eldoni novan gazeton "Lingvo Internacia". Vald. Langlet, prezidanto de la klubo en Uppsala, faris la unuan vojaĝon uzante Esperanton en pluraj landoj, Paul Nylén eldonis novan lernolibron, kaj la membroj en Uppsala la unuan fojon parolis en Esperanto kun vizitanta eksterlandano.

Agado ĝis la unua mondmilito. Pluraj svedoj veturis al Boulogne — sur — Mer (en 1905) en Francujo por partopreni la Unuan Universalan Kongreson de Esperanto. La jarojn pli poste en la tuta mondo aperis novaj kluboj kaj

landaj asocioj. Jam en 1898 la nuna Grupo Esperantista en Stokholmo fondiĝis, kaj sekvis en Svedujo ne nur pluraj lokaj societoj sed ankaŭ en 1906 la nuntempa Sveda Esperanto Federacio. La gazeto "Esperantisten" aperis dum mallonga tempo, kaj baldaŭ (en 1913) sekvis ĝin la unua numero de La Sveda Esperanto Gazeto La Espero. En tiu ĉi periodo oni rimarkis i.a. jenon: Harald Thilander, blindulo, uzis la Braille-sistemon en Esperanto, la unua eldono de la "Esperanto-ŝlosilo" aperis en 1906, la svedoj bone defendis Esperanton kontraŭ IDO, kaj ili ĉiuj donis fortan subtenon al Universala Esperanto Asocio (UEA), kiam ĝi fondiĝis en 1908. Ĉe la Universala Kongreso de Esperanto en Dresden svedoj prezentis teatroprogramon en Esperanto ("Fraŭlino Julie" de Strindberg). Krome parlamentano Carl Lindhagen en 1911 proponis internacian lingvon, kaj svedaj esperantistoj serĉis kontakton kun eksterlandaj gesamideanoj ĉe la Olimpiaj Ludoj en Stokholmo (en 1912).

Dum la Unua Mondmilito (kaj kelkajn jarojn poste). Dum la milito la interrilatoj kun eksterlando ne estis grandaj, sed tamen fondiĝis en la lando Sveda Instruista Esperanto-Federacio kaj Eldona Societo Esperanto (ambaŭ en 1918), kaj samjare okazis la Unua Skandinava Esperanto-Kongreso en Göteborg. Redaktoro Sven Jerring kunludis ĉe teatroprezentado en Esperanto, la t.n. mondlingva komitato de Lindhagen sendis proponon al la Ligo de Nacioj pri internacia lingvo, kaj (en 1922) Sveda Esperanto-Instituto fondiĝis. En 1920 oni notis aŭdiencon ĉe Reĝo Gustavo V:a pri provinstruado en Esperanto, kaj en 1922 okazis prova instru-fako pri Esperanto ĉe lernejo en Stokholmo (rektoro Sam Jansson). Ernfrid Malmgren gvidis en



1928 la unuan devigan Esperanto-kurson en lernejo ĉe Stokholmo. Edmond Privat vizitis Svedujon, Andreo Cseh prelegis, kaj Tib. Morariu venis por resti en la lando.

Literaturo. La jam fondita Eldona Societo pretiĝis nun kaj poste plurajn altvalorajn librojn en Esperanto. Menciindaj estis inter multaj "Sveda Antologio", "Per balono al la Poluso", "Tra sovaĝa Kamtĉatko", "La Fino", "Aniaro", "Malsata ŝtono" (en UEA-serio Oriento-Okcidento). Selma Lagerlöf donis en 1929 la eldonrajton pri ĉiuj siaj libroj. Aperis "Gösta Berling" kaj pluraj aliaj.

La koresponda kurso de SEF altiris grandan intereson en 1925 kaj en la postaj jaroj (ĉ. 4.000 partoprenantoj ĉiujare en la komenco).

En la 1930-aj jaroj. Radioprogramoj en Esperanto ĉiun monaton. Balta Esperanto-Kongreso en Stokholmo. Inter pluraj aliaj L. Sinha, Hindujo, estis gasto. 17.000 subskribis petskribon al la sveda radio pri programo en Esperanto. La 26-a UK okazis en Stokholmo. Radioprogramoj notitaj ĉiun dimanĉon de Uppsala (de 1935) kaj de Malmö (de 1938). SEF translokiĝis al Tegelbacken (en 1937), kaj filia oficejo de UEA malfermita en Stokholmo de 1936 sub gvido de Ernfrid Malmgren.

Dum la dua mondmilito. La filia oficejo de UEA en Stokholmo transprenis en la neŭtrala Sve-

dujo la aktivan laboron de UEA. La lingvopremion ricevis en 1943 Paul Nylén kaj poste ĉiun trian jaron gesamideanoj en kaj ekster Svedujo. La gazeto "Malgranda Revuo" naskiĝis. Somera Universitato en Malmö-Lund (en 1943).

Post la dua mondmilito. En 1947 Ernfrid Malmgren fariĝis prezidanto de UEA. Somera Universitato en Uddevalla (1946) kaj radiodisaŭdigoj per kurtaj ondoj. La 33-a Universala Kongreso de Esperanto okazis en 1948 en Malmö. Ek de 1953 oni notis en ses diversaj jaroj prelegsemajnoj en Frostavallen. Svedujo kolektis konsiderinde grandan sumon por helpi al UEA sendi delegiton al UNESKO en Montevideo. Norda Prismo aperis en 1957. Svedaj esperantistoj kolektis mondon por

sveda ĉambro ĉe UEA en Rotterdam. En 1965 Nordlanda Esperanto-Kongreso okazis en Oslo. En 1981 Sveda Esperanto-Federacio kaj la Klubo de Malmö en Malmö kune festis sian 75-jaran jubileon.

En 1954 Göteborg ricevis la Esperanto-placon kaj en 1981 Malmö la Esperanto-straton. En la gazeto "Dagens Nyheter" aperis en 1983 alvoko pri lingvo (Esperanto) en UNO. Subskribis 75 personoj el diversaj tavoloj de la socio en Svedujo. En 1986 Ingemund Bengtsson, prezidanto de la sveda Parlamento, proponis, ke UEA ricevu la pacpremion de Nobel.

Universalaj Kongresoj de Esperanto en Svedujo. Okazis 3-foje. En Stokholmo (1934), en Malmö (1948), denove en Stokholmo (1980).

Aliaj internaciaj aranĝoj. Plurfoje internaciaj kongresoj diversfakaj. Ĉiujare specialaj "tagoj" inter la skandinavaj Landaj Asocioj. Altnivelaj prelegsemajnoj okazis plurfoje en Frostavallen. Antaŭ- kaj postkongresoj ĉe UK.

Svedaj membroj ĉe internaciaj Esperanto-organizaĵoj. En fakorganizaĵoj pluraj svedoj estis estraranoj kaj funkciuloj. La Komitato de UEA notis multajn svedojn en diversaj periodoj. En la Estraro de UEA Ernfrid Malmgren estis prezidanto, Erik Carlén vicprez, kaj krome aliaj ĉe diversaj postenoj. En la Akademio de Esperanto (kaj antaŭe Lingva Komitato) estis notindaj Paul Nylén, Karl Söderberg, Ferenc Szilágyi kaj Ebbe Vilborg.

La plej unuaj

En La Espero Nro 4/1985, paĝoj 47-48, sub la rubriko la insigno de esperanto, ni rakontis, ke **B.G. Jonsson** el Östersund estis la unua kiu ĵetis al la esperantista mondo ideon pri nia insigno. Ni ankaŭ rakontis ke li en la gazeto Lingvo Internacia n:o 4 Aprilo 1896 anoncis ke li ŝanĝis nomon kaj adreson al **B.G. Siösteen**, Kristianstad. Nun ni scias pli. En la granda sveda enciklopedio "Nordisk Familjebok" staras:

"Siösteen, Gustaf, ĵurnalisto (naskiĝis 1874). Post 1899 kunlaboranto en "Göteborgs Handels- och Sjöfartstidning". Inter alie eksterlanda korespondisto en Londono 1899-1903, en Berlino 1903-1918 kaj ree en Londono 1923".

En la sveda **Kiu Estas Kiu** 1947 staras inter alie:

Eldonis lernolibron kaj plenan vortaron en la internacia lingvo esperanto 1893.

En la Informejo Esperantista, eldonita 1897 je la dekjara jubileo, estas listo pri la ĝis tiam el-

donitaj lernolibroj kaj oni legas: Por svedoj:

24. G. Henriclundquist, Dr. Esperanto's Internationellt språk (27) G Henriclundquist, Esperanto-svensk ordlista

55. G.H Backman. Fullständig lärobok i världsspråket "Esperanto" jemte två ordböcker

66. B.G. Jonsson. Lärobok med fullständig esperantisk-svensk ordbok

68. Uppsala Esperantoförening. Svensk-esperantisk ordbok

70. Upsala Esperantoförening. Läsöfningar i Esperanto.


95. A.P Nylén. Fullständig lärobok i det internationella språket Esperanto, med exempel och öfvingar

108. A.P. Nylén. Esperantisk-svensk ordbok (vortaro Esp.-sveda) n:o 66 jam ne plu ekzistas)

La filino **Astrid Walck-Siösteen** en Stockholm kaj la filo **Bengt Siösteen** Saltsjöbaden rakontas pri la patro:

Li havis nur 18 jarojn kiam li in-

★
ESPERANTO
100 JAROJ



Sveda Jarkongreso
10-13 aprilo 1987

STOCKHOLM

terkorespondis kun Zamenhof, kiu ege surpriziĝis pri tia juna korespondanto. La leteroj de Zamenhof estis tre interesaj kaj enhavis informojn pri la tiama rusa Pollando. La juna sveda esperantisto imagis, ke tiajn tute nekona-tajn cirkonstancojn en la lando oni ne povis priskribi en la rusa aŭ la pola. Oni devis uzi sekretan lingvon kiel esperanton. Li tradukis la leterojn al la sveda kaj montris ilin al la redaktoro de la loka ĵurnalo, kiu ege surpriziĝis kaj publikigis ilin sub la rubriko "Bref från Polen". Ŝajnas ke tio

estis la komenco kaj la kialo de lia estonto kiel ĵurnalisto.

Por havigi monon al la eldono de la lernolibro, la junulo kuiris kaj vendis melasbombojn al la glitkurantoj sur la lago de Östersund. Li ricevis 5 oerojn po peco. Li ankaŭ bredis kolombojn por vendi.

Dum sia vivo en Berlino kaj Londono kaj alie li multe studis, lernis, vojaĝis, spertis kaj fariĝis

pioniero ankaŭ kiel eksterlanda korespondisto. Li ĉiam estis idealisto sed li ankaŭ estis realisto. Inter alie li estis la unua kiu proponis ke la sveda poŝto kreu poŝtĝiran bankon jam dekkvar jarojn antaŭ la poŝto starigis ĝin. Pri tio oni povas legi en la memora libro de la Sveda Poŝto "Svenska postgirot 1925-49".


Astrid kaj Bengt Siösteen rakontas ankaŭ, ke esperanto

ĉiam estis vivanta en ilia hejmo. La patro dum sia tuta vivo ĉiam okupis pri la internacia lingvo skribe kaj parole.

Ne estas surprize, ke sur la tombŝtono de ilia patro estas skribite esperante: En la mondon venis nova sento.

Li mortis 1947 kaj estis enterigita en Råda ekster Göteborg.

Ingemar Nordin



Jubilea kongreso en inda medio Bonvenon al Stockholm, 10-13 de aprilo 1987!

La stokholma klubo kaj ĉiuj stokholmaj esperantistoj bonvensalutas vin al la ĉi-jara eksterordinara kongreso. La parlamenta domo kaj "kavalira salono" ĉe Stortorget, la antikva urbo donos al la

evento prestiĝan kaj festan kadron. Sed vi, karaj kongresanoj, kun Ingemund Bengtsson kaj Humphrey Tonkin en la unua vico donos la festan kaj prestiĝoplenan enhavon.

La jubilea diservo kiun aranĝas KELI estos en la centre situanta preĝejo Klara kyrka.

Koncerne aliĝon, manĝojn, hotelojn vidu "La Espero" numero 8/1986.

Glumarkoj por la jarkongreso 1987

Mendu kaj abunde uzu ilin!

Prezo por folio kun 16 pecoj en nigra-verda preso sur blanka papero:

1 folio 8 kr, 10 folioj 70 kr, + sendkonsto 2,50 kr.

pg-konto 481 43 95-2

SEF-jarkongreso c/o Lundkvist, Hägersten

Ekspozicio en la Poŝta Muzeo

Honore al la 100-jara jubileo SEF estas invitita aranĝi filatelan ekspozicion en la Poŝta Muzeo en Stockholm dum la jarkongreso de SEF 10/4-13/4 1987.

La muzeo donos al ni bonan lokon por la ekspozicio en la filmsalono apud la kafejo. Tie ni montros elekton el la granda kolekto de Anna-Greta Stönne, Malmö, pri filatelio ĉirkaŭ esperanto.

Oni vidos tie poŝtmarkojn kaj tutaĵojn eldonitajn okaze de esperantojubileoj, kongresoj kaj t.p., sed ankaŭ diverslandajn poŝtmar-

kojn pri famaj homoj kun intereso pri internacia lingvo, pri simpatuloj de esperanto kaj pri mondkonataj verkistoj, kies libroj estas tradukitaj al esperanto.

Kompreneble tie estos ankaŭ elelekto el la multaj poŝtstampoj kun esperantaj teksto aŭ temo.

La muzeo favore al ni uzos specialan stampon por leteroj kaj kartoj de la vizitantoj sabate la 10-an.

Ĉar la aranĝo de la Poŝta Muzeo estas vera honoro por la espe-

La Jubilea Programo

Tempo	Programo	Ejo
Vendrede 10/4		
12:00	Enloĝiĝo	
13:00	La kongresejo estas malfermata	La domo de Grill Stortorget 3-5
15:00	Preskonferenco (speciale invititaj)	Parlamentna domo
16:00	Inaŭguro de la jubilea kongreso de la parlamenta prezidanto Ingemund Bengtsson	Parlamentna domo
19:00	Festparolado de la UEA-prezidanto Humphrey Tonkin Interkona vespero kun mallongaj programeroj	La domo de Grill
Sabate 11/4		
09:00-11:30	Jarkunveno de SEF	Parlamentna domo
11:30-12:30	Lunĉo	
13:00-16:30	Jarkunveno de ceteraj organizoj: ILEI, KĈLI, SEFA kaj SEJU Paralelaj programoj dumtempe	Parlamentna domo
19:00	Bankedo Tesupeo por tiuj kiuj ne partoprenas la bankedon	Rest. Sjösidan La domo de Grill
Dimanĉe 12/4		
09:00-09:45	Diŝervop	La preĝejo de Klara
10:00-11:30	Jarkunveno de Eldona Asocio	Parlamentna domo
11:30-13:00	Lunĉo	
13:00-15:00	Humphrey Tonkin: Esperanto en la estonto	Parlamentna domo
15:00-	Vizito en la Mezepoka Muzeo, rondiro en Gamla Stan	
19:00	Distra vespero kaj fermo	La domo de Grill
Lunde 13/4		
09:00-12:00	Kolektiĝo por informo kaj disdono de flugfolioj en Sergels Torg, Gallerian, Fältöversten, Ringen.	
Sabate kaj dimanĉe		
11:00-15:00	Filatela ekspozicio kun speciala poŝtstampo	Poŝta Muzeo Lilla Nyg. 6

ranto-movado, certe ĉiu kongresano volas ĝui la eksterordinaran okazon.

La adreso de la muzeo estas **Lilla Nygatan 6**, do en la malnova urbo tre proksime la kongresejo.

Ĝi estas malferma ĉiutage krom lunde de la 11-a ĝis la 15-a.

Informationsprogram för närradio

Nu kan du köpa en ljudkassett med 10 stycken radioprogram på svenska.

Varje program är sex minuter och innehåller information om es-

peranto som kommunikationsmedel i världen. Alla program har samma uppläggning. De börjar med några takter av Jen nia mondo. Sen följer inledningen och huvudinnehållet med information om esperanto, därefter smakprov på ordbildning och grammatik, adress till EC och sista avslutningsord och några takter ur Jen nia mondo. Det är alltså ingen kurs, utan ett informationsprogram.

Programserien är författad av **Harolf Brown**. Den är inspelad i

Dag för årets Esperanto-examen: Söndagen den 26 april

Förfrågningar om och anmälningar både till högre och lägre examen kan ni göra till:

Ebbe Vilborg, Prästgårdsängen 2, 412 71 Göteborg. Tel. 031-40 52 74.

Examensavgiften kr 15:–, sätts in på Institutets postgiro 515 11-4.

Nyheter!

Nyckelring — jubileums-gåva — jubileumsaffisch

Inför jubileumsåret har informationskommittén, på uppdrag av styrelsen tagit fram ett par nya presentartiklar.

En Nyckelring med symbolen på ena sidan och en reklamtext på andra (se bild). En lämplig gåva även till icke-esperantister. Priset är kr 4:—, Vid köp av 10 st. lämnas 10 %. Sändkostnader tillkommer.

En finare jubileumsgåva i form av ett stående glasblock (se bild) med jubileumssymbolen på en polerad yta. Glasblocket är lämpligt för esperantister, som vill ha ett minne av 100-årsjubileet, men också som tackgåva till meriterade icke-esperantister. Upplagan är begränsad. Priset är kr 90:—. Sändkostnader tillkommer.

Jubileumsaffisch

För att visa att vi fyller 100 år har vi producerat en jubileumsaffisch. Format A3 (30x42 cm), alltså mycket lättplacerad. Affischen domineras av jubileumssymbolen (se glasblocket) och nedtill är en




en musikstudio och är inläst av professionella röster. Med ljudkassetten följer texten maskin-skriven, så att du kan ha en informationsserie även i den lokala tidningen, samt en bruksanvisning hur du kan använda bandet.

Allt detta får du för endast 90:— Med detta material kan du informera om esperanto varje månad 1987, eller du kan göra en intensiv-information för en speciell kampanj.

Hjälp till att förverkliga SEF:s mål, att alla människor i Sverige ska ha hört om esperanto innan 1987 är slut.

Du kan köpa denna ljudkassett från Esperanto Centro, Brunns-gatan 21, 11 38 Stockholm. Tel. 08-11 74 34.

KÖP DET IDAG FÖR 90:—!!!



banderoll med texten "Det internationella språket" Beige bottenfärg med text i grönt, svart och guld. Tanken är att den skall kunna användas i alla sammanhang, både ensam och tillsammans med vårt övriga affischmaterial.

Priset är kr 4:— per styck eller kr 35:— för 10 st. Till detta kommer emballage och porto.

Ring eller skriv till Esperanto Centro och beställ

(Den beräknas bli leveransklar i början av mars)

Nova kased-bendo...

Tute ne gravas

Amplifiki — Nordia ensemblo, konata i a de la Kultura Festivalo en Uppsala. Junaj muzikistoj.

Prezo: 100 kronor

Mendu ĉe Eldona Societo, Malmö pg 578-5 aŭ SEF, Esperanto Centro, Stockholm, pg 20 12-3.

Köp...

Den första läroboken på esperanto



Den första svenska esperanto-läroboken utkom redan 1889.

Dr. Esperanto. Internationell språk. företal och fullständig lärobok. (por svedoj) Öfversättningen verkställd av G. Henriclundquist.

Nu finns den här igen! Priset är 100 kr för ett numrerat ex., och drygt hälften av det går till SEF

för att stärka jubileumsårets ekonomi. **KÖP DITT EX. NU!**

Beställ genom att sätta in 100 kr på SEF:s pg 2012-3.

Esperanto Centro är öppet måndag-torsdag 08.00-16.00 och 17.30-19.00, fredag 08.00-15.00 lördag sept-maj kl 10.00-12.00.

Direktansluten medlem 100 kr
Familjemed. (utan tidning) 50 kr
dir.anslut. ungd.medlem 50 kr

Invito al Internacia kurso en esperanto

Kie? En Nordia Popola Altlernejo, Kungälv
Kiam? 9–13 junio 1987

En la programo estos

- Kursoj en 4 diversaj stadioj
- Prelegoj kun postaj diskutoj
- Interpretada ekzercado
- Studvizito aŭ ekskurso
- Diversspecaj distraj programoj vespere.

Kiom kostos? Sek 1.360:–, kiu inkludas manĝon kaj loĝejon en unu- aŭ dupersonaj ĉambroj.

Ĉiuj kostoj por kursoj kaj programoj.

Unua manĝo estos la 9an de junio je 12a h kaj la lasta adiaŭa kafo la 13an je h 14.30. (La prezoj validas kun rez. por event. prezaltiĝoj.)

Pluraj eksterlandaj esperantistoj kontribuos kiel instruistoj aŭ prelegantoj.

Aliĝkotizo: Sek 200:– al pĝ 71 93 50-1 Kungälv's Esperantoklubb.

Aliĝiloj kaj pliaj informoj:

Kungälv's Esperantoklubb, Märtha Andreasson, 2265 Tolsered, S-425 90 Hisings Kärra. Tel. 031-57 11 33.

Nordiska folkhögskolan/SEF, Okcidenta Regiono en kunlaboro kun La Esperantoklubo de Kungälv kaj Internacia Esperantokursejo en Pisanica, Bulgario.



Deltagare i förra årets kurs, 9/10 av den bulgariska gruppen + några från Kungälv's-klubben. Efter som Internacia Esperanto-Kursejo

också i år kommer att vara medarrangör, kommer även i år deltagare därifrån.

Foto: Göran Nilsson

Gruppresa till Warszawa

Nord Syd Resor arrangerar tillsammans med SEF en gruppresa till jubileumskongressen i Warszawa.

I nr 8/86 av La Espero finner du alla upplysningar om resan.

Många har redan anmält sig, men ännu finns det platser kvar. Det är ett bekvämt och trevligt sätt att ta sig dit och få allt ordnat på platsen.

Ansökan om tim- eller dagstudiestöd

Den som ämnar deltaga i en folkhögskolekurs kan ansöka om tim- eller dagstudiestöd från Vuxenutbildningsnämnden i sitt län.

Alla kan söka – förvärvsarbetande, pensionärer, hemmaarbetande. Bidraget utgår i första hand till lågutbildade.

Studiestödet utgår dels som internatbidrag och dels som inkomstbidrag, som tim- eller dagstudiestöd. Internatbidrag kan delas ut antingen för kursdag eller resdag. För samma dygn får stöd alltså inte rekvireras för både kursdag och resdag.

Under ett budgetår (1/7 – 30/6) får du stöd för högst 10 studiedagar och 2 resdagar. Internatbidraget är f n 190 kr/dag.

Inkomstbidraget utgår för varje dag du förlorar arbetsinkomst p g a att du deltar i kurs eller reser till och från kursorten. Beloppet är f n 228 kr/dag.

Det innebär också att du har rätt att vara tjänstledig utan lön, men utan inskränkning vad gäller semesterförmåner.

Inkomstbidraget kan också utgå som timstudiestöd för varje timma du deltagit i kursen och på grund därav förlorat arbetsinkomst. Resor till och från kursorten ersätts

Alta atesto por esperanto



Edukada konsilisto de SÖ Bengt Thelin. Fotis: Bernt Lindquist

"Homoj renkontiĝas" ("Människors möten") estas la titolo de la tria kajero en la serio de la sveda pacjardelegitaro. Verkisto estas la eduka konsilisto de La Supera Estraro de Instruado (S.Ö.) Bengt Thelin, bone konata de ĉiuj esperantistoj partoprenintaj en la Nordia renkontiĝo en Bengtsfors, kie li prelegis.

Lian pozitivan sintenadon al espe-

bara för förlorad arbetsinkomst med högst två timmar per studietillfälle.

Under ett budgetår (1/7-30/6) får du stöd för högst 70 studietimmar och 20 restimmar. Beloppet är f n 38 kr/studietimme.

Har du deltagit i studier genom din fackliga organisation slås det samman med din enskilda ansökan. Den sammanlagda tiden räknas.

Ansökningsblankett — "Enskild ansökan om tim- eller dagstudiestöd" hämtas på Arbetsförmedlingen.

Ansökningshandlingarna ska vara inne innan studierna påbörjas och senast 15/2, 15/8 och 15/11.

Adress till Vuxenutbildningsnämnderna finns på blanketten.

Vizito ĉe SÖ

La 13-an de novembro la prezidanto de SEF, Karin Lindquist, kaj mi vizitis SÖ. Ni estis akceptataj de la edukaj konsilistoj Bror Andered, kiu respondecas pri modernaj lingvoj, kaj Bengt Thelin, kiu respondecas pri pacedukado. Dum du horoj ni diskutis la eblecojn enkonduki esperanton en la hodiaŭan svedan lernejan sistemon.

Ekzistas multaj leĝaj kaj lernoplanaj bariloj, kiujn oni ne povas neglekti. La lernoplano ekzemple tre strikte regulas kiom da studhoroj ĉiu fako devas havi dum la tri stadioj. La lernoplano ankaŭ tre strikte regulas kiom da semajnaj studhoroj ĉiu klaso devas havi. Oni ne rajtas aldoni aŭ forpreni iun lecionon. Do, en la lernejo ni havas limojn. Se oni volas enkonduki novan fakon dum ekz.

ranto, montrita jam en Bengtsfors de Bengt Thelin, oni rimarkas ankaŭ en lia libreto. En la ĉapitro pri stud- kaj kontakturismo li skribas:

"Kategorio kun speciala kvalifiko por tia kontaktlaboro estas la esperantistoj. Esperanto estas ne nur lingvilo. La esperantomovado havas ankaŭ klare idealisman celon direktan al internaciaj kunlaboro kaj paco. Krome esperanto kaj ĝia movado havas fortan pozicion en la orienteŭropaj landoj. La lingvo ja estiĝis en Pollando, kie la kuracisto Ludvig Zamenhof konstruis ĝin antaŭ 100 jaroj. Zamenhof mem ja vivis en lingve konfuza medio. Lingva malsimileco estas granda malhelpo por pliboniĝo de kontaktiĝo kun Orienteŭropo, sed en tiu rilato la esperantoparolantoj estas favoruloj, kaj tiaj iniciatoj certe donus bonajn fruktojn."

Oni povas mendi la senkoston kajeron, Nr 3, ĉe Fredsårsdelegationen Box 161 21, 103 23 Stockholm.

unu leciono po semajno oni devas redukti la tempon por alia fako. Antaŭ kelkaj jaroj oni enkondukis liberajn aktivecojn en la meza stadio dum unu horo semajne en la kvina kaj sesa klasoj. Kiam oni faris tion oni prenis la bezonatan tempon de la orientigaj fakoj (historio, geografio, religio, naturscio, socia scio). Multaj instruistoj plendas pri tio. Se oni deziras enkonduki esperanton oni devas fari sammaniere. SÖ ne havas la rajton kaj potencon decidi pri tiaj aferoj. SÖ estas konsila, serva kaj esplora institucio. La parlamento decidas pri ŝanĝoj en la lernoplano post zorga esplorado. Do, enkonduki esperanton nun kiel ordinaran fakon je la sama nivelo kiel la germana aŭ la franca lingvoj estas utopio.

La ne tro favora sinteno de la instruistaro dependanta de malbona aŭ nenia kono pri esperanto ankaŭ multe ĝenas. La aktuala laborsituacio ankaŭ ludas rolon.

Ekzistas tamen aliaj vojoj ekz. kiel aldona fako en la 7-9 klasoj. Oni bezonas ellabori lokan laborplanon kiu devas esti akceptata de la lerneja estraro (skolstyrelsen) kaj de la regiona lerneja estraro (läns skolnämnden). Poste minimume 5 gelernantoj devas elekti la fakon, alie oni ne ricevas permeson komenci la kurson. Mi konas almenaŭ tri komunumojn en Svedujo kiu havas tiajn laborplanojn akceptitajn sed nenie sufiĉe de gelernantoj elektis la temon.

Alia ebleco estas uzi la tempon por liberaj aktivecoj. Ĉi tie la kluboj povas fari grandan laboron. Al tiuj lecionoj oni ne bezonas profesiajn instruistojn. Taŭga esperantisto povas sin anonci kiel gvidanto. Ofte la komunumoj ne



havas monon kaj ili certe bonveni-
gas malmultekostajn idealistojn.

Ni nun tuŝas grandan problemon. Mankas al ni sufiĉe da kompetentaj esperantoinstruistoj. Tial niaj intencoj nun ne ĉefe estas komenci lingvajn studojn en la lernejoj sed nia celo plie estas diskonigi scion pri la ideo kaj la lingvo esperanto.

Eblaj fakoj tiucele estas ekz. sociorientigaj studoj kaj ĝenerala lingvoscio. Ni ankaŭ volas informi la estontajn instruistojn ĉe la altlernejoj. Bona ideo estas igi eldonistojn de lernolibroj skribi iomete pri esperanto en novaj eldonaĵoj koncernaj la supre menciitajn fakojn. La materialo Lerneja projekto de Harold Brown ankaŭ bone taŭgas. La konsi-

listoj donis multajn bonajn kaj pozitivajn ideojn kaj montris veran intereson pri nia temo. Ili ankaŭ montris plurajn solvojn de diversaj problemoj. Ili estis ege afablaj kaj multe helpis. La vizito ĉe SÖ estis pozitiva kaj kuraĝiga travivaĵo.

Fine: La lokaj kluboj povas fari multon, ĉar la komunumoj mem decidas pri sufiĉe multe enkadre de la ŝtataj limoj. Demandu la rektorojn ĉu vi rajtas veni al la lernejo kaj informi; aliĝu kiel gvidantoj dum temaj tagoj pri paco; aliĝu kiel gvidantoj de liberaj aktivecoj; se vi havas instruiston kiel klubmembro igu lin/ŝin fari laborplanon por aldona fako ktp! Loke vi povas fari multon.

Bertil Andreasson

Vivu, progresu, sed lerni ne ĉesu! (Zamenhof)


Ĉu vi parolas kaj skribas esperanton svede? Multaj faras. Tro multaj. Certe oni trovas en la jena numero de La Espero plurajn ekzemplojn pri tiu afero, verkistoj kiuj skribis esperante sed pensis svede, kaj tial la esperanta teksto povas esti malfacile komprenebla de alilandanoj.

Miaopinie kuŝas risiko en la facileco de la lingvo esperanto. Oni tre rapide lernas la fundamenton de esperanto kaj tuj scipovas uzi la lingvon kaj ankaŭ tuj ĉesas studi ĝin plu.

Tielmaniere multaj el ni estiĝas kaj restas "bonantagon-esperantistoj" kun tre limigita lingva povo.

Tial la zamenhofa proverbo super inspiru nin al plua kaj ĉiama studo kaj ni proponas al vi jenajn librojn:

Claude Piron, Gerda malaperis
19.00 kr.



Claude Piron, Lasu min paroli plu
56.00 kr.

Marjorie Boulton, Faktoj kaj Fantazioj
138.00 kr.

Pagu al Esperantoförlaget, Malmö, poŝtgiro 578-5, aŭ al Esperanto Centro, Stockholm, poŝtgiro 2012-3.

Ingemar Nordin

Du interesaj libroj!

De la Grupo de Esperantistaj Edukistoj en Francujo mi ricevis leteron en kiu oni ofertas du diversajn librojn al svedaj interesuloj. Oni skribas jenon pri la libroj:

1. **La diroj de mateo**, de la franca pedagogo Célestin Freinet. Tiu 176 paĝa libro, per siaj saĝaj vortoj, invitas nin al pli taŭga, pli efika, pli moderna pedagogio. Ĝi estas gvidilo kaj cerbumilo por ni instruistoj kaj ankaŭ por la gepatroj. Ĝi povas esti bona propagandilo en esperantistaj kaj ne-esperantistaj medioj.

Ĝia realigo estas la rezulto de multthoma kunlaborado.

2. **Kiel bretono iĝis reĝo de Anglujo**, de Per Jakez Helias, bretonkaj franclingva verkisto. Tiu 55 paĝa broŝuro entenas ankaŭ la tradukon de kelkaj paĝoj el "Le Cheval d'orgueil", "La fiero-ĉevalo", grava libro de la sama aŭtoro. La ilustraĵoj estas verkoj de lernejoj el elementa lernejo kaj junaj esperantistoj.

La diroj de mateo kostas 50 sv.kr. + sendokostoj, kaj Kiel bretono iĝis reĝo de Anglujo kostas 16 sv.kr. + sendokostoj. Interesuloj sin turnu al Bertil Andreasson, Södra Rörum pl 455, 242 00 Hörby, 0415-501 52.

Veteranoj

Dum la jubilea kongreso en Varsovio la veteranoj kunvenos kaj vizitos la tombon de Zamenhof. En kelkaj landoj la veteranoj havas specialan landan asocion. Veterano ja estas esperantisto, kiu dum 40 jaroj restas fidela al nia idealo: Esperanto la internacia lingvo.

En ĉiu klubo certe estas veterano. Kara Veterano, bonvolu ko-

TRA LA LANDO

Suda regiono

Tv-elsendado en Landskrona

En loka TV-kanalo, kiu sendas en Landskrona, Hugo Mohlin havis tre amuzan programon pri esperanto. Hugo estis gastiganto kaj la gastoj, kiujn li invitis estis Sten Svënonius kun sia hungara edzino kaj eta knabo, Clas Svensson, kiu estas radioamatoro, kaj Åsa Andersson, kiu vojaĝis pere de Pasporta servo. La programo donis bonan informon pri esperanto, kaj artikoloj pri ĝi aperis en kelkaj tagaj gazetoj. La programon, kiu ekzistas en televida bendo, vi povas pruntepreni de Hugo Mohlin, Tranchellsgatan 81, 261 35 Landskrona. Tel 0418-116 06.

Lisbet Andreasson

Sudorienta regiono

Regiono Småland – Blekinge 1987

En nia regiono estas kelkaj, kiuj studas leterkurson. Eble ni provos aranĝi semajnfina kurson iam dum 1987 por havi eblecon renkonti unu la aliajn kaj eble pligrandigi la grupon. Semajnfina kurso povas samtempe funkcii kiel regiona renkontiĝo.

Alia vojo laŭ kiu ni laboras en Småland-Blekinge-regiono estas

lekti la nomojn de ĉiuj veteranoj kaj sendu ilin al la jena adreso: **Olle Olsson, Södra Esplanaden 23, 223 52 Lund.** Informu pri nomo, adreso, naskiĝotago kaj la jaro, kiam Vi lernis esperanton, volonte ankaŭ pri instruisto, lernolibro ktp. Dankon pro Via helpo.

enpenetri en la sociojn per kunlaboro kun bibliotekoj per programoj, informlaboro, ekspozicioj – enpenetri en societoj per la turneantoj de SEF. Ewa & Anita kantgrupo el Pollando "enpenetros" en societoj, bibliotekoj kaj lernejoj en ses diversaj urboj.

Ni provos sendigi programon pri esperanto en proksimradio aŭ loka radio. Ekzistas kelkaj planoj. Ni planas aperi artikolojn de "Tio program för närradio" en lokaj gazetoj.

Mi havas kelkajn kontaktojn kun instruistoj en diversaj urboj kaj kun politikistoj.

Mi esploras pri la ebleco kunlabori kun Visingsö folkhögskola pri esperanto-kurso.

Kerstin Rohdin

TEDU-regiono

Ankoraŭfoje Motala Esperantoklubo aranĝis grandan vesperfeston kunlabore kun pluraj aliaj asocioj en Motala, i.a. la loka UN-asocio, Rädda Barnen, Lions Club, Kvinnoförbundet för fred och frihet. Dum la vesperfesto ludis poldevena Elzbieta Glabowna pianon kaj Lihkören kantistoj kaj ankaŭ lokaj muzikistoj partoprenis. La kolektita mono estis komplete sendita al Flykting -86.

La novfondita klubo en Hällefors aranĝis dum la aŭtuno kurson kaj ankaŭ ekspozicion dum pluraj monatoj en bibliotekoj en tiu parto de la gubernio. Tio kaŭzis artikolojn en du lokaj gazetoj.

Krome, Lennart Svensson en Filipstad, la vera aktivulo de la klubo kiam temas pri la eksterdirekita laboro, havas bonan kontakton kun i.a. la popolaltlernejo en Molkom (kie li planas viziton de Anita kaj Ewa en aprilo).

Ŝajnas ke la popolaltlernejoj

estos la estonta medio por esperanto – almenaŭ ni en la TEDU-regiono forte kredas tion. Krom la semajnfinaj kursoj nun fine de januaro en la popolaltlernejo de Karlskoga, tiu lernejo planas kursojn dum la somero (26/6-3/7 1987). Kaj Kjesäters popolaltlernejo en Vingåker petis prelegon pri esperanto, ĝi okazis la 19-an de januaro.

Gunilla Sundholm

DANKON



Koran dankon pro viaj bonvenaj

Donacoj

Donacoj

Erik Axlund, Vällingby 20:–
Yngve Sörman, Johanneshov 50:–
Einar Lindberg, Eskilstuna 25:–

Klubo Cent 1986

Oskar Svantesson, Göteborg
Börje Andersson, Skövde
Sven Strandberg, Lund
Olle Olsson, Lund
Ove Kleborgh, Hässleholm

Klubo Cent Jaroj

Malte Smith, Kävlinge 500:–
Margit Levi, Påryd 100:–
Ragnar Hjort, Stockholm 100:–

Klubo Cent 1987

Ragnar Hjort, Stockholm.

Venis do la unua "membrokotizo" por Klubo Cent por 1987. Kaj kompreneble estas nia tre fidela kontribuanto Ragnar Hjorth, kiu unue pagis...

Sed ankoraŭ estas tempo por esti membro por 1986. Kial ne samtempe pagi por ambaŭ jaroj al Svenska Esperantoförbundet, poŝtgiro 2012-3?

Ĝis nun 41 membroj pagis 4 100

La 22-an de nov. mortis en Uppsala Erik Johansson, en aĝo de 91 jaroj. Li lernis Esperanton 1930 kaj estis fidela membro de la Esperanto Societo de Uppsala.



Hjalmar Andersson, Malmö, unu el la plej energiaj membroj de Klubo Esperantista de Malmö, forpasis la 14-an de januaro 1987. Li naskiĝis en 1904, esperantiĝis en 1931, kaj estis membro de la konata studrondo "La Verda Oko". Li fariĝis prezidanto de la klubo. Prefere oni memoras lin laŭ lia karesnomo "Patro Hjalmar", kiam li estis klubmastro. Dankon por ĉio. Ripozu li en paco.

Jan Strönne

Forpasis unu el la pli gravaj personecoj el la historio de Eldona Societo Esperanto. Hjalmar Andersson oficiale forlasis nian estraron antaŭ multaj jaroj, reale li restis inter ni ĝis preskaŭ lia lasta tago.

Nia centro en Malmö estis la celo por lia granda intereso kaj amo. Li ĉiam aperis tie, ĉiam preta helpi.

Ni sentas la grandan mankon, ni perdis persone tre sinceran, fidelan amikon.

Åke Blomberg

kronojn al Klubo Cent 1986. Estas ĉiujare preskaŭ la sama fidela aro. La nombro en 1985 estis 40...

Aliflanke ni tre ĝojas ke 59 membroj pagis po 100 kronoj al Klubo Cent Jaroj kompare kun nur 11 pasintjare. Sed estas nature ke tiu cifero altiĝas des pli proksima estas la jubilea jaro – do ni atendas 100 membrojn dum la jubilea jaro 1987!

La kasisto

Fine de sia okdek unua vivojaro Erik Carlén, Hällabrottet, mortis la 27an de novembro 1986. En la esperantista movado li aktive agadis jam de 1923, kiam li kiel gimnaziano lernis la lingvon kaj tuj poste fervore movade engaĝiĝis. Jam en siaj sekvaj studjaroj ĉe Altlernejo de Komerco li en Stokholmo renkontis multajn inspirodonajn esperantistojn, inter ili la bonkonatajn pionirojn Paul Nylén kaj Sam Jansson; tiu lasta tiam estis rektoro de la prestiĝa lernejo de Beskow, en kies hejmo li estis bonvena gasto.

Erik Carlén eniris la industriaran entreprenon de sia patro Carl August Carlén en Yxhult-Hällebrottet, kie li post jaroj de praktikado baldaŭ akceptis gravajn gvidajn postenojn kune kun sia pli juna frato Bertil. En la kreskanta industrio, kiu poste fariĝis vaste konata kiel Ytong-Konzerno, Erik C akceptis postenon kiel estrara prezidanto kaj estis ankaŭ, alterne kun sia frato, aganta ĉefdirektoro.

Kiel kursgvidanto li agadis jam en fruaj jaroj, li ofte invitis prelegistojn kaj funkciis publike kiel lerta interpretisto. Nomoj kiel Lakshimiswar Sinha, Andreo Cseh, Tiberio Morariu rilatas la jarojn pasintajn.

Tra la jaroj Erik ofte skribis artikolojn pri Esperanto en la sveda gazetararo, li tradukis librojn en Esperanton, li verkis por svedoj Esperanto-Gramatikon eldonitan 1962, kiu ankoraŭ estas tre ŝatata kiel fidinda instruilo, li kunlaboris kaj respondecis pri la sveda parto de la konata 9-lingva Internacia Komerca-Ekonomika Vortaro, kiu estas grava fakverko kun bazaj difinoj en Esperanto.

Nepre grava en la vivo de Erik estis lia kristana kredo, sincera kaj profunda, kaj ankaŭ liaj multaj amindaj agoj surbaze de tiu absoluta konvinko. En Kristana Esperantista Ligo Internacia (KELI) li estis fidela membro kaj

en la jaroj 1948-1955 prezidanto. En la samaj jaroj li estis redaktoro de la KELI-organo Dia Regno. Sveda KELI Sekcio faris lin estrarano, en kiu posteno li ĉiam laboris ageme kaj ofereme. Por menciigi unu eksterordinaran aferon, Erik alvokis svedan KELI-aninon, s-inon Anna Sandgren, eniri Esperanto-misian servon tuj post la dua mondmilito. En tiu tempo Anna estis konata sub la nomo Anna Alamo. Ŝi eniris tiun gravegan helpoagadon, en kiu ŝi ankaŭ apogis sin je ekonomia subteno de i.a. Erik Carlén. En pluraj landoj de postmilita Eŭropo la paketoj kaj iom post iom ankaŭ la vizitoj de Anna estis bonkonataj. Ankoraŭ vivas esperantistoj, kiuj memoras tiun benatan mision.

Sveda Esperanto-Federacio havis fidelan membron kaj kunlaboranton en la personeco de Erik C. Kiel komitatano de UEA li reprezentis la svedan esperantistaron dum pluraj jaroj. La UEA-komitato elektis lin vicprezidanto kaj fine li ankaŭ fariĝis Honora Membro de UEA.

Ni ne forgesu, ke Erik malavare kontribuis por plibonigi la ekonomion de la Esperanto-movado. Li ankaŭ sukcesis sur aliaj kampoj. Por kelke da jaroj la mondkonata Radio IBRA, kiu emisias programojn per Radio Trans Europe el Portugalio kaj Malto, dank'al EC ankaŭ uzadis Esperanton. Kurioze estas pensi, ke Erik en sia junaĝo komence de la 20-aj jaroj fakte parolis Esperanton en disaŭdigo de provizora radiostacio en Örebro; tio okazis kiam ankoraŭ ekzistis la ŝtata Radio de Svedio. (Estus interese scii, ĉu EC povus esti rigardata kiel la unua persono en la mondo, kiu aŭdiĝis Esperanton en Radio - kvankam en limigita skalo.)

Inter iniciatoj de Erik verdire estas menciindaj du aferoj: Semajno de Internacia Amikeco (SIA) kaj Monda Turismo, am-

Kalendaro

MARTO

- 13.3-18.3 Internacia simpozio pri Esperanto-Turismo
 19.3-24.3 Internacia Renkonto de Esperanto Teatroj
 20.3-23.3 28-a Landa kongreso de Hungara Esperanto Asocio
 20.3-23.3 5:a Internacia Esperanto Teatra Renkonto
 20.3-22.3 Jarkunveno de SAT

Budapeŝto
 Budapeŝto
 Budapeŝto
 Budapeŝto
 SATEB, Romford, RM 6 6Eb

APRILLO

- 1.4-5.4 Junulara Esperanto renkontiĝo
 3.4-5.4 Nederlanda E:o Kongreso
 3.4-5.4 Jubilea Junulara Renkonto
 10.4-13.4 81-a Sveda E:o Kongreso
 11.4 Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, sveda sekcio
 11.4 Kristana Esperantista Ligo Internacia. Sveda sekcio
 11.4 Sveda Esperanta Fervojistaj Asocio
 11.4 SEJU
 15.4-21.4 Internacia junulara Festivalo/ 2a Mediteranea Festivalo
 17.4-20.4 Jubilea Brita Eo Kongreso
 17.4-24.4 Novspeca nacia Esperanto-Kongreso
 17.4-24.4 3-a PSI kaj 65-a Germana E:o Kongreso
 19.4-25.4 Internacia renkontiĝo de infanoj
 24.4-26.4 Amikeca Renkonto de Esperantistoj
 20.4-3.5 15-an Scienca Interlingvistika simpozio

Gödöllő, Hungario
 Amersfoort
 Hej, pf 193, H-1368 Budapest
 SEF, Brunng. 21
 111 38 Stockholm
 Bertil Andreasson
 S. Rörum, 242 00 Hörby
 Britta Rehm, Kopparmynts.3,
 414 79 Göteborg
 Evert Rausek, S. Bulltoftav 56
 B, 212 22 Malmö
 SEF, Brunng. 21,
 111 38 Stockholm
 Torino
 W S Jenkins, 14 Gelligaled
 Abergavenny
 Rastatt, Germanio
 Gresillon, F-491 50 Baugé
 Pécs, Hungario
 Akademia Centro Interlingvistika, Warszawa

MAJO

- 1.5-4.5 Internacia Literatura Forumo
 8.5-10.5 Zamenhof Internacia Pacmarŝo
 16.5-22.5 39-a IFEF Kongreso

Poitiers, Francio
 Kampadejo de Vojaĝoficejo
 Express en voro cemaros
 Katowice, Pollando

Pliajn informojn oni povas ricevi ĉe Esperanto Centro

Daŭrigota en venonta numero

baŭ rekonataj kaj utilaj en la tutmonda movado esperantista.

Ni gesamideanoj, kiuj havis favoron proksime konatiĝi kun Erik C, povas konstati, ke lia koro ĉiam varme batis por Esperanto. Pri lia sindono kaj bonvolo neniam estis dubo. Lennart Åberg

Ĉe la sepulta ceremonio la 12an de decembro en Betesda-preĝejo de Hällabrottet parolis Lennart Åberg nome de UEA kaj SEF. Por KELI parolis la prezidanto de la Sveda KELI-Sekcio Bengt Olof Nilsson kaj Anna Alamo-Sandgren. Krom la supre menciitaj esperantistoj partoprenis ankaŭ la multjara sekretariino de Erik Carlén, f-ino Karin Larsson kaj Gösta Fredriksson de la loka klubo kaj s-ino Aino Åberg, Gotenburgo.

Klubo Cent Jaroj kaj Klubo Cent alvokas ĉiujn!

Dum 1986 multaj membroj de SEF kontribuis al la federacia kaso per donacoj kaj per membreco de Klubo Cent kaj Klubo Cent Jaroj. La estraro kore dankas por ĉiu donaco, granda aŭ malgranda.

Sen tiuj donacoj nia nuntempa agado ne estas ebla. La elspezoj estas grandaj precipe por Esperanto Centro kaj por "La Espero". Nur la lukostoj por Esperanto Centro en la centro de Stokholmo estas 43.700 kronoj. Krome venas kostoj por telefono, elektra kurento, asekuro ktp.

"La Espero" perdas nun la ŝta-

tan subvencion, ĉirkaŭ 10.000 kronoj pojare, ĉar tia tipo da gazetaro ne plu havos tian apogon. Iamaniere ni nun devas rekomenci tiun perdon.

La jaraj kostoj por afranko estas pli ol 10.000 kronoj.

La estraro pretigis multe da informa materialo. Ĝis nun la kluboj tamen ne aĉetis tiun en tia amplekso kiel ni esperis. La ekonomio de SEF multe pliboniĝos se la kluboj kaj membroj nun faros grandajn mendojn...

Tamen - por la ekonomio ni



Konkurso de Internacia Asocio Monda Turismo por la jubilea jaro de esperanto, 1987

Ni invitas vin partopreni la konkurson "Esperanto en turismo" pri jenaj temoj:

1. "Kion fari por esperanto-turismo post la jubilea jaro de esperanto?"

Alvena limdato: 1987-03-15.

La plej bonaj konkursaĵoj estos premiitaj per senpaga partopreno en la konferenco de Monda turismo okazonta dum la 12-aj Tagoj de Bydgoszcz 1987, julio 18-24.

2. "Ĉu esperanto-turismo helpas la esperanto-movadon?"

Alvena limdato: 1987-09-15.

Premioj: senpagaj partoprenoj en Esperanto-aranĝoj en la jaro 1988.

La konkursaĵojn bonvolu sendi en du tajpitaj ekzempleroj al la adreso de vicprezidantino Elisabeta Pallòs, Ybl Miklós u. 9. I.2. H-7633-Hungario.

Monda turismo rajtigas sin publikigi la plej interesajn konkursaĵojn ĉu fragmente, ĉu plenforme. Ĉiu konkursinto dum la jaro 1988 ricevos la eldonaĵojn de Monda turismo.

Atendante viajn utiligeblajn kontribuaĵojn ni deziras al vi sukceson.

Estraro de Monda Turismo

daŭre devas alvoki klubojn kaj membrojn malavare donaci.

Precipe ni esperas ke dum la jubilea jaro 1987 multaj kontribuos al Klubo Cent Jaroj. Ĉirkaŭ 60 membroj pasintjare pagis 100 kronojn al tiu "klubo". Ĉu ni povas esperi ke venos pliaj 100 dum 1987? Kompreneble vi povas pagi pli ol 100 kronojn se vi havas eblecon.

Pli ol 40 esperantistoj estis en

1986 membroj de la alia "kontribua klubo", Klubo Cent. Ankaŭ al tiu klubo ni esperas havi pliajn membrojn dum 1987, pagante minimume 100 kronojn.

Aliaj donacoj, grandaj aŭ malgrandaj, estas ankaŭ bonvenaj al la poŝtgira konto de Svenska Esperantoförbundet, 2012-3.

La kasisto

HERR
STEN SVENONIUS
ERIKSTORSGATAN 26 A

217 54 MALMÖ

Den firas över hela världen

Internationella Vänskapens Vecka

Semajno de Internacia Amikeco


sista hela veckan i februari

Internationella Vänskapens Vecka vill påminna oss om våra vänner; att sända dem ett brev, ett kort eller en liten gåva (t. ex. en bok, en grammfonskiva, en äsk choklad eller en blomma).

Låt denna vecka bli en maning för dej och mej att ge vänlighet och vänskap över gränserna.

— för en bättre, ljusare och varmare värld.

Internationella Vänskapens Vecka har lanserats av Esperanto-rörelsen, vars ideal är förståelse och vänskap över gränserna.



Amikeco trans limoj

Poŝta Muzeo



Vänskapens vecka

Affisch	8 kr
Brevmärken, 5 ark	7 kr
Postkort, 10 st	8 kr

Beställ i god tid hos Esperantoförlaget, Malmö, postgiro 578-5.